



ELNA-BULTENO

ESPERANTO-LIGO POR NORDA AMERIKO

Numero 5(70)

Oktobro 1970

Aŭtuna Studkurso per Radio

S-ro Robert L. Willis, edzino de leĝ-profesoro de la Universitato Ohio State, kaj lingvoinstruistino, gvidas radio-kurson en Esperanto per WOSU-AM, stacio de la Universitato. Artikolo aperis en la loka ĵurnalo (Columbus Dispatch) la 6an de sept., 1970.

Junulpoŝtmarkklubo

La sekretario de ELNA, S-ro Fisher, estis en ĵurnalbildo en Meadville, Pa., (Tribune, 19an de sept., 1970) kiel ano de la poŝtmarkklubo, kiu komencis en publika biblioteko novan junulpoŝtmarkkolektantgrupon.

Parolado pri Kongreso kaj Ekskurso

S-ro James Deer donis raporton pri la universala kongreso en Vieno, kaj priparolis sian vojaĝon al Sovet-Unio, kiam kunvenis la Esperanto-Societo de Portland, Oregon, la 21an de sept., 1970.

Esperanta Simpozio

S-ro Jonathan Pool, estraro de ELNA, kaj verkisto de Turka-Esperanta lernolibro, estis kondukanto de simpozio en la Universitato de Loyola, en Chicago, Ill., la 12an de sept., 1970.

Inĝeniero, Piloto, kaj Doktorino

En publika biblioteko, la 24an de sept., 1970, en Chicago, Ill., inĝeniero Mark Chertow paroladis pri lingvaj baroj, piloto Robert Runser klarigis kiel la indiĝenaj naciaj lingvoj daŭrigas la lingvan problemon, kaj D-rino Gertrude Novak montris la kialon, ke Esperanto povas solvi ĝin.

Enigmoj, Vortludoj, Novaĵoj, kaj Redaktoraj Opinioj

S-ro Denis LeCam, redaktoro de "La Golfeta Esperantisto" (de SFERIDO, junulara filio de SFERO en Norda Kalifornio) ankoraŭ publikigas informplanan amuzigantan gazeton, kiu eĉ inkluzivas diskutojn pri scienc-fikcio!

NI KORESPONDU

Esperantaĵojn ĉiame povas uzi S-ro Jeong Jong-Hyu, P.O. 106, Gwangju, South Korea, por sia "Stelo-Amika Klubo."

Esperanto-Grupo gvidata de S-ro Algimantas Pijus Vizgirdas (29-jara), P.O. 167, Klaipeda, Lithuania, ĉiame volas korespondi kun geusonanoj.

70-jara samideano akceptus volonte plimulte da usonaj korespondantoj. Li kolektas filatelisteme poŝtmarkojn. S-ro Heinrich Bense, 6081 Rotterode, Obere Strasse 1, West Germany.

Aŭta elektroteknikisto serĉas usonan korespondamikon. Li ŝatas librojn, filmojn, kaj bildkartojn pri la sporto. Molnar Geza Kaposvar, Damjanich ut 25, Hungary.

Hispana civitano, S-ro Eduardo Soteras, Rambla 46, 10 Alicante, Spain, estas korespondemulo, kiu deziras amikon en Usono.

Fervojista Esperanto-Rondo volas interesi usonanojn en interŝanĝado de ilustritaj koloraj poŝtkartoj. S-ro H. Kinzel, Bitterfelder Straasse 91, DDR 727, Delitzsch, Germany.

ELNA-BULTENO

REDAKTORO : Rodney Ring

ELNA-Bulteno
ADRESO: Muhlenberg College
Allentown, Pa. 18104

Nordamerika Esperanto-Revuo (estinta) estas havebla de S-ro Fisher, Meadville, Pa., se oni nur sendu poŝtkoston kaj citu bezonatan numeron.

ARTIKOLOJ

K A M P A R A R A K O N T O

La opinio, ke kamparanoj preferas manĝi nur viandon kaj terpomojn, aŭ vivas, rilate al nutraĵo, je malaltnivelo de eleganteco, malĝustas. Oni pensas, ke la kamparnutraĵo estas enuiga, milda, kaj senvarieca, pro la nescio pri la du apartaj manĝspecoj en la komparo: unu estas neformala kaj la alia estas formalega.

Kiam okazas neformala manĝo, ne estas granda kvanto da nutraĵoj, kaj ofte ĝi estas ekster la domo. Ĉe mia domo tia manĝokazo estas sur la herbo de la domkorto, kie ni sidas senseĝe kaj uzas arbustumpon kiel tablo. Supre estas vinberujo-strukturo, por ke ni bezonas nur levigi la manojn por kolekti vinberojn. En la interno de la stumpo, kiu estas kava, ni konservas la alkoholtrinkon (Ĝi estas "lunbrilaĵo," kaj mi esperas, ke la imposto-kolektantoj ne legas ĉi tiun!).

Okcidente de la stumpo estas la ĝardeno, tiel proksima, ke ni povas kolekti legomojn dum ni manĝas. La pomarbo staras apude sur la orienta flanko, por ke neniam manku al ni pomoj.

La bovino en la paŝtejo sur la suda flanko estas sufiĉe proksima, ke ni ĉiam havu "laktofonton." Lageto sin trovas flanke de la pomarbo, kaj ni ofte fiŝkaptas dum ni manĝas.

Ĉar ni ne uzas telerojn sur la stumptablo, ne estas telerpurigdevo. La ne-manĝit-eroj restas tie kiam ni foriras, por a) nutri la malgrandajn bestojn (sciurojn, fazanojn, pegojn, hundidojn, kaj katidojn), kaj por b) enriĉigi kaj replenigi la grundaĵon de la tero. En la komparo ni zorgadas pri terkonservo.

La preciza kontraŭo estas la formala manĝo. Ĝi estas en la domo, kaj oni tiam portas bonvestaĵon, sekvas altnivelkutimojn, kaj servas manĝsortimenton en granda kvanto kun diverseco. Oni servas apetitigerojn. Ni ŝatas delikataĵojn ne ĉie aĉeteblaj. Sur buterpanon oni metas surmetaĵon de diversspecaj viandoj, fiŝoj, ovoj, fruktoj, aŭ de ĉio ajn inter ĉielo kaj tero. Kamparanoj dum kelkaj malmultaj minutoj povas fari bongustan manĝaĵon por neatendite alvenintaj amikoj kaj gastoj. Ofte ĝi havas la aspekton de artobjekto, kiel spicita ŝinko rostita, koktelkolbasoj, ringoj de ajlo, malmolkuirita ovflavo kun ŝinko hakita - ĉio en ovŝelo, kun surmetitaj olivoj, aŭ celerio ŝmirita per blua fromaĝo kremita!!

Grava virto dum tia formala manĝo estas gastameco. Mia najbaro, S-ro Maynard Oskar Tel, rakontis al mi historion, kiu bone montras ĝin: Unu tagon aŭtobuso plena da vizitantoj atingis lian domon dum formala manĝo. La tuta familio laboregis en la servado, kaj poste insultigis kiam la vizitantoj deziris pagi la kalkulon! Ili diris, ke aŭto ĉe la frontvojo anoncis, ke ĉi tiu estas "Motel." Ili eraris: Estis lia nomo "M.O.Tel." Maynard Oskar Tel. Nur povas okazi ĉi tiu en la kamparo!

LA INVENTISTO KAJ LA LOKOMOTIVO

de G. V. BENGTON

Antaŭ kelke da jaroj vivis en Ameriko tre famkonata viro. Se vi post la legado de ĉi tiu rakonto, emos foliumi en iu enciklopedio por vidi, kion tiu viro klopodis fari, vi komprenos, kial li daŭre estis okupata kaj despli, ke tion, kion li volis li sukcesis, fari, ĉar li scipovis apliki la tempon.

Iun tagon la famkonata viro hazarde havis tempon por edziĝi, kaj post tre multe da jaroj li necesis toleri, ke liaj nepoj, ne atentante pri lia fameco kaj okupateco, devigis lin eksidi en brakseĝo kaj diris tion, kion ĉiuj genepoj en la tuta mondo diras en tia situacio:

"Avo! Rakontu historion!"

Ĉu la famkonata avo mildiĝis pro la petegoj de la nepoj, aŭ ĉu estis pro la proksima kristnaskofesto, ne estas difinebla, sed la avo rakontis historion kaj jen ĝi sekvas:

"Mi rakontos pri la plej stranga kristnaskvespero, kiun mi iam travivis. Tiam mi estis tre, tre juna. Mi ĵus finlernis kiel telegrafisto kaj havis diversajn deĵorojn dum mallonga tempo. Ne pro tio, ke mi scipovis mian fakon, sed pro tio, ke mi estis okupata pri fizikaj kaj kemiaj eksperimentoj kaj tial tro ofte forgesis la deĵortempon en la telegrafstacio. Jes, eĉ okazis, ke mi ĉe la telegrafaparato sidis meditante pri eksperimentoj, kiuj igis min forgesi ĉion - ankaŭ la telegrafaparaton, kiu vokis.

Mi deĵoris en malgranda stacio en la kamparo, kaj ĉar je tiu tempo estis tre facile ricevi laboron en la fervojstacioj, mi ekvagis al la plej proksima stacio, kaj iris inter la reloj pro la pli mallonga distanco.

Mi tute ne malĝojis pro tio, ke mi estis maldungata - eĉ en la kristnaskvespero. En la pensoj mi havis nur la eksperimentojn kaj daŭrigis tiel, dume mi stumple trotadis antaŭen sur la malebenaj ŝpaloj en la malluma, silenta kristnasknokto.

Kiam mi estis irinta du horojn, ekblovis kaj ekpluvis samtempe. Ne daŭris longe, antaŭ ol mi estis tute malseka, ĉar tiam mia ekonomie ne permesis al mi aĉeti mantelon.

Unu horon mi ankoraŭ eltenis, kaj tial estis al mi evidente, ke mi apenaŭ povus atingi iun stacion en tiu vespero. Tial mi decidis trovi ejon, en kiu mi povis tranokti.

La sukceso estis al mi. Subite mi videtis la konturojn de iu granda domo, kiu situis sur la tereno de la fervojo. La reloj kondukis laŭ flanktrako tute al la domo, kaj al mi estis klare, ke estis iu lokomotivremizo.

La pordegoj en la fronto de la remizo estis sekure ŝlositaj, sed fenestro estis nefermita. Tra ĝi mi havis eniron al ŝirmo kaj tranoktejo.

Estis nigre mallume en la granda, ligna domo. Mi staris momenton senbrue por aŭskulti, ĉu iu ĉeestas. Sed ne aŭdiĝis alia sono ol la tamburado de la pluvo sur la tegmento.

Mi bruligis alumeton. Kiam ĝi ekflamis, mi ekvidis lokomotivon stari en la remizo. Tiumomente mi forgesis, ke mi estis laca kaj malvarma. Multon mi legis pri lokomotivoj kaj verece kaj emege deziris vidi tiun antaŭ mi.

Jen la okazo ĉeestis, kaj mi utiligis ĝin. Mi trovis lanternon, eklumigis ĝin kaj grimpis sur la maŝinon por festi mian plej solecan kaj strangan kristnaskvesperon.

En la fajrujo kuŝis hejtaĵo preta por ekbruligi la venontan matenon. Mi sentis malvarmon kaj estis malseka. Estis tial tute nature, ke mi per

alumeto ekbruligis la hejtaĵon. Mi malfermis la valvon por la trablovo, kaj iom poste ekflamis klara kaj petola fajro sub la kaldrono, kaj la fumo ondadis supren tra la aperturoj en la tegmento.

Dume mi studis ĉiujn mezurilojn, instrumentojn kaj manprenilojn, fariĝis tiel varme, ke mi povis pendigi la vestojn por sekigi en la eta, gemuta gvidistejo. Mi tute forgesis mian malsaton kaj fartis bonege, dume mi ripetis ĉion, kion mi sciis pri vapormaŝino kaj lokomotivo.

"Se mi tiras tiun stangon malsupren!" diris mi penseme al mi mem, "sammomente mi tiras ĝin, la vaporo pasas de la kaldrono tra la tuboj al la glitujoj kaj la piŝtoj moviĝas, kaj la radoj ekrulas antaŭen!"

Kaj tion ili faris!

Mi sufiĉe hejtis por fari agrablecon al mi kaj sekigi mian veston. Dum kiam mi studis la instalaĵojn de la gvidistejo, estiĝis premo en la kaldrono, kaj kiam mi ektiris la startilon, mi aŭdis surdigan siblegan de vaporo, kiu premis sin siblante eksteren.

Rigardo al la premezurilo montris al mi, ke estis ĝuste: La montrilo atingis la ruĝan markon, kaj nun ekveturis la lokomotivo.

Subite tondris fortega krakego en miaj oreloj, kaj mi ricevis puŝon, tiel ke mi eksidis kaj preskaŭ ruliĝis malsupren de sur la maŝino. La lokomotivo traveturis la fermitan frontan pordegon kaj disrompis ĝin.

Mi ne havis tempon por pensi.

La lokomotivo ekrapidis kaj muĝis eksteren laŭ la trako, eksteren en la kristnasknoka blovo, kaj mallumo, kun la fajreroj kirlantaj kiel festa artfajraĵo supren el la fumtubo.

La malvarma blovo siblis tra la gvidistejo, kaj mi ekurĝis por vesti min. Feliĉe la vesto estis seka, kaj kiam mi estis streĉinta pecon da tolo ĉe la blovflanko, estis tre agrable varmeta antaŭ la ardanta fajrujo.

Mi ĝuis la veturadon!

Je tiu tempo la trajnoj ne veturis nokte, tial mi sciis, ke mi estis sola sur la fervojlinio. Sed ne daŭris longe, antaŭ ol mi fariĝis atentema. Mi ja veturis la saman direkton reen, de kie mi venis pli frue en la vespero. Do, mi revenus al la sama stacio, de kiu mi ĵus estis maldungita.

La staciestro ne povus ne atenti lokomotivon muĝantan preter la stacion ... Li volus telegrafi al ambaŭ najbarstacioj. Oni volus elsendi kontrolpatrolon el ambaŭ flankoj, kaj jen la historio finiĝus.

Ne, tio ne okazu, nun necesis nur eltrovi, kiel la maŝino estu haltigita.

Jes, mi ja povus fermi por la vaporo. Ne, tio ne sufiĉas. Se la trako estus malsupren kliniĝanta al la stacio, la lokomotivo tamen veturus pluen.

Mi manipulis ĉiujn mantenidojn kaj aparatojn kaj fine trovis tion, kio funkciigis la bremsan. Singarde mi bremsis kaj sentis je mia ĝojego, ke la rapido tuj reduktiĝis, ĝis kiam la lokomotivo haltis.

Nun temis pri kiel retroen veturigi ĝin.

Denove mi rigardis al ĉiuj aparatoj en la gvidistejo: Certe estas tiu tenilo tie supre? Mi tiris ĝin kaj ekscitite malfermis por la vaporo.

Jes, estis vere la ĝusta: Per pezaj puŝoj la maŝino denove veturis, sed la kontraŭan direkton, reen al la remizo.

Jen la maŝino denove muĝis sur la trako kun la fajreroj kirlantaj el la fumtubo. Tio amuzis min urĝi antaŭen per la plena vaporpremo, kiun la kaldrono toleris.

Kia ludo, kia rapido kaj streĉo - kia kristnaskfesto!!

Mi amuziĝis bonege. Estis mirinde povi bridi tiun grandan, pezan maŝinon, tiun bruantan ŝtalbeston, nur per facilaj manipuloj!

La nokto estis daŭre malluma, kaj subite frapis min: La remizo! Kiel mi sufiĉe frue povus vidi ĝin kaj redukti la rapidecon?

"Mi necesas veturi pli singarde!" pensis mi, kaj sammomente kiam mi etendis la manon por fermi la vaporvalvon, mi ricevis tondran bruon en la oreloj. Mi falis sur la planko, dum kiam vitrosplitoj flugis ĉirkaŭ mi.

Mi estis atinginta la remizon kaj traveturis la alian frontpordegon.

Tuj mi bremsis, ĉar mi havis la senton, ke stacio estis proksima, kaj veturis laŭ funebra movo reen al la remizo, kiu nun konsistis el nur tegmento kaj du muroj.

"Nun ne plu estas io riskebla!" mi pensis, kiam mi lasis la lokomotivon grimpi en la mistraktitan remizon. "Jen estas tio, kion oni nomas libera traveturo!"

Se la remizo ŝanĝis aspekton, ankaŭ la lokomotivo ne plu similis sin mem. Dum ĉiuj miaj klopodoj mi enigis akvon kaj vaporon en la fumtubon. La tuta maŝino estis kovrita per fulgo kaj cindro. La kaldrono estis malplena, kaj la fajrujo estis ŝtopita per rubo kaj cindro.

Mi havis sufiĉe da fantazio por imagi la lokomotiviston kaj hejtiston, kiam ili transprenu la maŝinon la postan matenon. Al mi estis tute klare, ke la kristnaskfesta etoso ne povus savi min, tial mi singarde foriris.

La postan matenon mi ricevis deĵoron en tiu stacio, kiu estis apud la detruita remizo.

La unuan telegramon, kiun mi ekspedis, estis informo pri malica detruo de remizo kaj malpurigo de maŝino. Tiun telegramon mi ekspedis tre zorgeme kaj konscieme, ĉar kun ĝojo mi atentis la finon: La detruo into nekonata!

Jes, per tio finis la avo sian rakonton. Vi certe jam divanis, kiu li estis?

Estis li, kiu eltrovis la eskandeskan lampon, la fonografon kaj centojn da aliaj aparatoj. - Vi nepre lin konas?

Thomas Alva Edison.

(S-ro Johan Krogstie tradukis la artikolon el la dana. Ĝi aperis en La Internacia Fervojista, N-ro 6, Decembro 1969, kaj ni ricevis ĝin de ELNA-Estrarano S-ro William H. Schulze;R.R.)

K O M P A T I N D A H U N D O de Joseph Conroy

Foje, kiam mi vizitis en Francujo, mi eniris kafejon meze de popola ĉirkaŭaĵo de Parizo. Tie mi vidis tri virojn, kiuj sidis ĉirkaŭ tablo. Kun ili ankaŭ sidis bruna hundo. Ili sin amuzis per kartludo. Kompreneble mi tre surpriziĝis pro tiu hundo, kaj mi iris al la tablo por peti eksplikon.

"Pardonu, Sinjoroj," mi komencis, "Ĉu tiu ĉi hundo vere scias ludi je kartludo?"

"Jes," respondis al mi grizhara maljunulo.

"Kaj ĉu li vere scias distingi la kolorajn gravuraĵojn de la karto?"

"Jes," alia grizharulo respondis.

"Tiu ĉi hundo estas mirindega!" mi konstatis. "Ĉu li bone ludas?"

"Bedaŭrinde ne," respondis la tria viro. "Ĉiam, kiam li havas bonan grupon da karto, li svingas la voston!"

POR STUDANTOJ

G U T E N B E R G

Johann Gutenberg, germana presisto de la 15a jarcento, estas kutime menciata kiel la unua persono kiu uzis moveblajn presliterojn. Lia kruda, simpla invento estas je la komenco de interesplena historio, kiu kondukas al la grandegaj, komplikaj presmaŝinoj de hodiaŭ. Ĝi vere kontribuis al la disvastigo de scio, ĉar ĝi ekebligis plirapidan, malaltprezan reproduktadon de libroj en pli granda kvanto. Ĝis tiam oni kopiis librojn mane.

S-ro Gutenberg naskiĝis en Mainz, kaj la nomo de sia patro estis Gensfleisch, kiu signifas "anserviandon." Li preferis kaj uzis la nomon de sia patrino. Li bone edukiĝis kaj komencis sian laborvicon per juvelarfarado. Kelkaj historiistoj kredas, ke la sigelringoj, precipe tiuj uzataj de nobeloj por enpremi iliajn sigelojn sur dokumentoj, donis al li la ideon por la nova presmetodo. Oni ne scias ĉu li konis la rulskarabojn de Egiptujo, aŭ la cilindrajn rulumajn sigelojn de Asirio.

Unue li eksperimentis per alfabeto presista konsistante el literoj dorsantaŭe skulptitaj sur surfaco de lignaj blokoj, nomitaj preskliŝoj. Li kunŝnuris ilin, ŝmiris ilin per inko, kaj presis ilin kontraŭ pergameneno. Poste li decidis, ke plumbo plibone estus ol ligno. Li do elpensis metodon por kuntenigi paĝon de presliteroj. Tiam li bezonis nur konstrui manfunkciigeblan metalan presilon por uzi ĉi tiujn tabulojn inkŝmiritajn.

Monon li prunteprenis de Johann Fust, por subvencii la aferon en Mainz; sed pro monmanko li ne povis repagi, kaj li perdis ĉion al S-ro Fust. Tio estas unu el la bedaŭrindaj okazoj de historio.

Oni facile diras, ke S-ro Gutenberg estas la "inventisto de presado," kaj ankaŭ, ke la Biblio Gutenberg (1456) estas la unua presita libro. Sed ĉi tiu ne estas certe. Antaŭ longtempe en la oriento ekzistis diversaj presmetodoj. Blokpresado, per supremoj de gravuritaj tabuloj de ligno, aŭ de aliaj materialaĵoj, estis konataj en Japanio tiel frue kiel la 8a jarcento. Libro, presita de blokoj en 868 a.K., troviĝis en Ĉinio. Meze de la 11a jarcento, persono en Ĉinio, kiu nomiĝas Pi Ŝeng, presis tekstojn per moveblaj presliteroj faritaj de fajenco.

Fakte, ne estas facile distingi, en la komenco de preshistorio, la mankopiitajn aŭ la pres-skribitajn manuskriptojn, ĉar oni skulptis la literojn kaj kompostis la paĝojn kun la celo, ke ili estu similaj.

La plej fruaj Eŭropaj presoj, faritaj de tiu ĉi metodo, verŝajne estas iuj dokumentoj de la eklezio, leteroj kaj kronikoj (1454-5), kiujn oni presis en Mainz. Eble S-ro Gutenberg mem faris la laboron!

La Biblio Gutenberg ofte nomiĝas "Mazarin," ĉar estas versio en la oficiala vulgat-latin-lingvo, kaj kopio estis trovita en la biblioteko de la fama Kardinalo Mazarin. Estis presita de S-ro Gutenberg.

Scio de la nova presmetodo de Gutenberg disvastiĝis tiel rapide, ke ĝis la fino de la 15a jarcento, presejo sin trovis en preskaŭ ĉiu grava urbo de Eŭropo, kaj ĝi venis al Anglujo en 1477, kiam S-ro William Caxton presis la unuajn librojn en la angla lingvo.

En Nordameriko la unua presmaŝino estis en "Mexico City" je la unua duono de la 16a jarcento; kaj la unua en la kolonioj estis en Cambridge, Mass., en 1638 (kiu poste fariĝis presejo de la Universitato Harvard). Ĉiuj en Usono hodiaŭ heredis de Johann Gutenberg, ĉu li estas "inventisto de presado" aŭ ne, grandan profiton kaj utilon.